Ili do sidiĝis, kaj dum kelkaj minutoj *neniu* parolis. Alicio pensis interne, " Kiamaniere li povos fini, se neniam li komencos, *tion* mi ne povas kompreni." Tamen ŝi pacience atendis.

" Iam en la pasinto " diris fine la Falsa Kelonio kun profunda ekĝemo " mi estis *vera* Kelonio."

Sekvis tiujn vortojn tre longa silento, kiun interrompis nur la okazaj interjekcioj (*Hjckrrh, Hjckrrh*) de la Grifo kaj la konstanta plorĝemado de la Falsa Kelonio. Alicio preskaŭ decidiĝis levi sin kaj peti forpermeson, dirante. ' Mi tre dankas vin, sinjoro, por via interesa rakonto.' Tamen, ĉar ŝi supozis, ke li nepre diros iom pli, ŝi restis trankvile, kaj nenion diris.

" Kiam mi estis malgrandulo " fine la Falsa Kelonio daŭrigis iom pli trankvile (kvankam eĉ nun li plorĝemis ne malofte) " la gepatroj sendis min al lernejo en la maro. La instruisto estis iu maljuna kelonio—ni kutime nomis lin Testud'—— "

" Pro kio vi nomis lin Testud " ĉar li ne estis Testudo ? " interrompis Alicio.

"Ni ja nomis lin Testud', ĉar li estis fame konata *te-studento*, kaj tre ŝatis paroli pri la te-kulturo. Ĉu vi ne povis konkludi tion, ne demandinte ? "

La Falsa Kelonio evidente indignis, ke pro ŝia malspriteco li devis doni tiun klarigon.



Kaj la Grifo aldonis : " Vi dev
mandinte pri tia simpla afero."
Tiam, por doni pli fortan e
riproĉo, ambaŭ sidis silente k
Alicion, ĝis pro konfuzo ŝi estus
ke la tero malfermiĝu kaj kovru
Grifo diris al la Falsa Kelonio :
" Vi rapidu, malrapidulo ! oni n
atendi la tutan tagon."
La Falsa Kelonio daŭrigis per je
" Jes, ni iris al la lernejo en la m
vi eble ne kredas tion—— "
" Mi ne diris ke mi ne kredas
Alicio.
" Vi ja ofte diris tion " diris la F
" almenaŭ se vi similas aliajn hom
Kaj antaŭ ol Alicio povis re
Grifo ekkriis al ŝi severe : " Vi ferm
La Falsa Kelonio daŭrigis :
instruadon ni havis ; fakte, ni
ĉiutage—— "
" Pri tio vi ne devas fanfaroni
" ankaŭ mi iras en ĉiutagan lernej
" Ĉu vi lernas *ekstraĵojn* ? "
Falsa Kelonio.
" Jes " respondis Alicio " la fra
kaj la muzikon."
" Ankaŭ la vestlavadon ? " dem
Falsa Kelonio.



LEWIS CARROLL *La Aventuroj de Alicio en Mirlando* Esperanto translation (Illustrated by Brinsley Le Fanu) LONDON, 1910 THE BURST